*La Letero de l'Akademio de Esperanto* 25 (1993), p. 8. ISSN 0986-1181

# Primitiveco de kelkaj adverboj

Christer Kiselman
Membro de la Akademio de Esperanto kaj ties Sekcio pri Gramatiko

En artikolo en *La letero de l'Akademio de Esperanto*, N-ro 23, paĝo 5, Cleber Lemos interesveke atentigas pri problemo en Esperanto. Ĉu ni konsideru la adverbojn *nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre* kaj *volonte* kiel primitivajn aŭ derivitajn? Jen miaj rimarkigoj pri liaj kvar proponitaj solvoj.

Respondo al la demando devas kaj respekti la vortfaradon en la nuna lingvo Esperanto, kaj respekti la Fundamenton, kiu ja difinas la vortojn – aŭ almenaŭ ties uzadon en 1905.

En la lingvo ne aperas iuj vortoj "neprea", "oftea", "parkerei" ktp. Tio jam ekskludas la solvon 3 (nome konsideri *nepre* ktp. kiel radikojn).

En la Fundamento la radikoj *nepr'*, *oft'*, *parker'*, *precip'*, *spit'*, *supr'* kaj *volont'* aperas ĝuste tiel, kun la signeto ', kiu indikas ke ili ne estas memstaraj vortoj, sed radikoj kiuj devas esti kompletigitaj per finaĵo por fariĝi vortoj. Kaj en la lingvouzo ja estas tiel. Tio ekskludas la solvon 2 (nome deklari *nepr*, *oft* memstaraj vortoj).

La solvo 4 (nome difini la koncernajn adverbojn kiel derivitajn) ne unuavide kontraŭas la vortfaradon: se oni deklaras ekzemple ke la radiko *parker'* havas verban karakteron, alivorte ke la verbo *parkeri* estas primitiva vorto, tiam la aliaj parencaj vortoj, ekzemple *parkere, parkerigi*, konservas siajn sencojn. Tiu solvo do ne ĝenas la vortfaradon, almenaŭ ne en tiu ĉi kazo. Ĝi ankaŭ similas iomete al la sistemo de *Plena Analiza Gramatiko*, kie oni kalkulas ĉiujn adverbojn kiel adjektivojn el la vidpunkto de vortfarado. Sed ĝi ne respektas la Fundamenton, ĉar laŭ la Fundamento *ofte*, ekzemple, estas adverbo, ne adjektivo. Aparte menciindas la substantivo *supro*, kiu ja estas en la Fundamento, sed kiel derivita de *supr'*. La solvo 4 ankaŭ ne respektas la principon ke la primitiva vorto havu la plej bazan sencon, eliran por la vortfarado.

Tial mi opinias ke ni devas doni al la sep menciitaj radikoj adverban karakteron, alivorte atribui primitivecon al la sep adverboj *nepre, ofte, parkere, precipe, spite, supre* kaj *volonte*. Al ili oni povus aldoni la adverbon *prunte*, kiu, same kiel la sep menciitaj, estas primitiva laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*. Ili do estas same primitivaj kiel *baldaŭ*, kaj tamen finiĝas per *-e* kiel la neprimitiva *matene*. Tio estas la solvo 1. Kial nur derivitaj adverboj finiĝu per *-e*?

La solvo 1 proponita de Cleber Lemos, kiu estas ankaŭ tiu de *PIV*, estas do laŭ mia opinio la sola kiu fidelas al la ekzistanta lingvo.